

VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti
pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.

Odpovědný redaktor – DR. Josef HRADIL, Mnichovo Hradiště 718

Cena – dobrovolný příspěvek

Povolil ONV MLADÁ BOLESLAV, odbor kultury 47/87-403/16

JANUARO 1989

Numero 1 Číslo

LEDEN 1989

NOVAN JARON ĉiu bonvenigas kun deziro de feliĉo kaj sano. Ankaŭ ni samon deziras al niaj legantoj. Ni – gesamideanoj ĉiuj kun ĝojo atendas ankaŭ disvolvon de nia aktiveco kaj sukcesojn dum nia agado. Ni ĉiuj sentos feliĉon, se almenaŭ io plenumiĝos, el niaj idealoj pri interkompreniĝo en la mondo. Ni ne volas stari flanke de okazaĵoj, kiuj movas la mondon. Blovas favora vento, aperas ĉiam novaj homoj, sopirantaj pri paca solvoj de gravaj problemoj de la maltrankvila mondo. Ili havas bonan intencon, kelkaj eĉ fortan volon – ni helpu al ili por interkompreniĝo ilia per disvatigo de nia kara lingvo! Ĉiu komence de la jaro starigu demandon: Kiel mi povas helpi? Kaj serĉu respondon. Ĉu ni pretas amasan disvastigon de nia lingvo? Ni ĉiuj devas plibonigi niajn lingvokonojn. Nun mi havas bone funkciantan asocion, kiu servos al ni por tia celo. Ĝi liveras sufiĉe da kvalitaj helpiloj, ni kun malpacienca atendas eldonon de la nova vortaro en Ŝtata pedagogia eldonejo, kiun enhavos ĝis datajn terminojn, kiuj mankas en malnovaj vortaroj. Ni posedas gravan koncizan gramatikon de Malovec, kiun povas envii al ni alilandanoj.

NOVÝ ROK všichni vítají s přáním štěstí a zdraví. Také my přejeme totéž našim čtenářům. My – samideáni – s radostí očekáváme také rozvoj naší aktivity a úspěchy v naší činnosti. Naše pocity budou šťastné, když se alespoň něco z našich ideálů splní v dorozumění ve světě. Nechceme stát stranou událostí, které hýbou světem. Vane příznivý vítr, objevují se noví lidé, toužící po mírovém řešení těžkých problémů neklidného světa. Mají dobrý úmysl, někteří i pevnou vůli – pomozme jim v jejich dorozumění i rozšiřování našeho drahého jazyka. Každý necht' si na počátku roku postaví otázku: Jak pomoci? a hledej odpověď. Jsme připraveni na hromadné rozšíření našeho jazyka? Všichni musíme zlepšit naše jazykové znalosti. Nyní máme dobře fungující svaz, který nám pro tento cíl slouží. Dodává dost kvalitních pomůcek, s netrpělivostí očekáváme vydání nového slovníku Státním pedagogickým nakladatelstvím, které bude obsahovat současné výrazy chybějící ve starých slovnících. Máme důležitou stručnou Malovcovu gramatiku, kterou nám mohou cizinci závidět.

Ankaŭ nia redakcejo starigas al si demandon: Kiel ni povas plibonigi niajn servojn al la legantojn? La prezoj de esperantaj gazetoj altiĝi tiel, ke ne eblas al ĉiu esperantisto aboni ĉiujn gazetojn, kiujn li volus legi. Via financa kontribuo helpis al ni, ke ni povas aboni preskaŭ ĉiujn gazetojn, kiuj estas laŭlegeaboneblaj pere de Poŝta gazetara servo kaj pere de nia asocio. Ni en nia klubo almenaŭ elektos kelkajn plej interesajn artikolojn kaj en la nova rubriko: Ni legis ... ni informos nian leganton pri ili. Ni scias, kie estas malforta loko de esperanta gazetaro. Bedaŭrinde mankas centra havebla gazeto, kiu estu eldonata en sufiĉe granda kvanto por ebligi al ĉiuj legantojn freŝajn informojn por modera prezo. Espereble en estonteco kunordigo de esperanta agado almenaŭ en socialismaj landoj komprenos tiun postulon kaj unuigos la fortojn por eldono de tia gazeto. Multaj eĉ plendas, legante similaj referaĵojn en diversaj esperantaj gazetoj. Ĉiu el ni povas helpi per sendo de interesaj artikoloj, kiuj ĉiu povas prezenti en sia klubo kaj helpi altigon de la nivelo de klubaj kunvenoj. Estas inter ni eminentuloj, modestaj, kiuj ankoraŭ ne majstras la lingvon tiom, ke ili povu kuraĝi mem prezenti lingve kvalitan prelegon. Devo de spertaj samideanoj estas dece proponi helpon lingvan kaj tiel helpi al la klubo, kaj kuraĝigi novajn samideanojn. Eble eĉ vi scias proponon, kiel plibonigi agadon de kluboj. Publikigu ĝin en nia gazeto! En la novan jaron kun kuraĝo kaj optimismo!

Tiu ĉi numero estas varbcele preparita per pli bona presmaniero en presejo. La afero havas mankon: Ni devas liveri materialojn antaŭ antaŭ la preso. Por tio ni pardonpetas, ke kelkaj informoj ne plu estas freŝdataj.

BONA ESPERO – estas esperanta lernejo en brazila praarbaro por infanoj senhejmaj, gvidata de geedzoj Grattapaglia. Nun estas instruitaj 34 infanoj. El inter ili deko devas el familioj, kiuj loĝas en „veraj domoj“, kvankam ankaŭ tiuj sen akvo-instalaĵo kaj sen elektra kurento; alia deko vivas kun la familioj en domoj liveritaj de la lernejo mem kaj resto devenas el la arbaro rekte.

Také naše redakce si staví otázku: Jak může zlepšit naše služby čtenářům? Ceny esperantských časopisů se zvýšily natolik, že každý esperantista si nemůže abonovat všechny časopisy, které by chtěl číst. Váš finanční příspěvek nám umožnil, že si můžeme předplatit téměř všechny časopisy, které jsou předplacitelné prostřednictvím Poštovní novinové služby a našim svazem. V našem klubu alespoň některé zajímavé články vyberme a v nové rubrice: Ni legis ... budeme o nich čtenáře informovat. Víme, kde je slabé místo esperantského tisku. Chybí bohužel dostižný centrální časopis, který by byl vydáván v dostatečně velkém množství, aby umožnil všem čtenářům čerstvé informace za mírnou cenu. Doufejme, že v budoucnosti společné vedení esperantské činnosti alespoň v socialistických zemích pochopí tento požadavek a sjednotí síly pro vydávání takového časopisu. Mnozí si dokonce stěžují, že čtou obdobné referáty v různých esperantských časopisech. Každý z nás může pomoci zasíláním zajímavých článků, které může každý předvést ve svém klubu a pomoci zvýšení úrovně klubových schůzek. Jsou mezi námi vynikající členové, skromní, kteří ještě neovládají jazyk natolik, aby se mohli odvážit sami přednést jazykově kvalitní přednášku. Povinností zkušených samideánů je nabídnout jazykovou pomoc a tak pomoci klubu i dodat odvalu novým členům. Snad i vy máte návrh, jak zlepšit činnost klubů. Zveřejněte ho v našem časopisu! Do Nového roku s odvahou a optimismem!

Toto číslo je náborově připraveno kvalitnějším tiskem v tiskárně. To má nedostatek: Musíme dodat materiály 3 měsíce před tiskem. Prosíme proto o prominutí, že některé informace nejsou už čerstvé.

BONA ESPERO – je esperantská škola v brazilském pralese pro děti bez domova, vedená manželi Grattapagliovými. Nyní se učí 34 dětí. Z nich desítka pochází z rodin, které bydlí ve „skutečných domech“, ačkoliv tyto jsou bez vodní instalace a elektrického proudu; jiná desítka žije s rodinami v domech, poskytnutých školou a zbytek pochází přímo z pralesa.

Eduka institucio Bona Espero aplikas principon de Unuiĝintaj nacioj „helpi la homojn-helpi al si mem“. Ĝi instruas al la infanoj de la kamparo kiel, per malmultekostaj rimedoj, oni povas plibonigi siajn vivkondiĉojn. Kiel kontribuo al la Jubilea jaro de Esperanto kaj al la Internacia jaro de senhejmuloj, Bona Espero konstruis en 1987 plian domon por loĝigi novajn senhejmajn infanojn kaj, dum la lernejoj ferioj, gastigi la partoprenantojn de renkontiĝoj de ekslernantoj kaj de Esperanto-seminarioj. Finance kontribuis la „Societo por la Progrese de Bona Espero“ en Federacia Respubliko de Germanujo, al kiuj apartenas esperantistoj el 11 landoj.

Ni bondeziras! Prezidanto de Ĉeĥa esperanto Asocio inĝ Petr Chrdle sukcese defendis sian kandidatan disertacian verkon antaŭ scienca kolegio de Instituto de radiotekniko kaj elektroniko de Ĉeĥoslovaka akademio de sciencoj. Eĉ en tiu-por li grava vivmomento – li ne forgesis propagandon de Esperanto. Nome aŭtoreferajo de lia kandidata verko enhavas dupaĝan resumon en Esperanto.

20 jaroj de Ĉeĥa esperanto Asocio. Solena renkontiĝo okazos dum la tria kvartalo de la jaro 1989, sed la loko ankoraŭ ne estas konata. Estas serĉata klubo, kiu povus trovi salonojn kaj loĝejon, same kiel prepari ekskursan kaj laboran programon. Kiu kuraĝos?

El la laboro de niaj lernantoj (kurso por progresintoj):

Kio signifas por vi Esperanto?

Esperanto signifas por mi interesan lingvon kun simpla gramatiko kaj ĉefe Esperanto signifas por mi ne esti soleca inter homoj. Esperanto signifas havi amikojn almenaŭ surpapere. Esperanto signifas, ke eblas trovi interesajn geamikojn eĉ en malpli proksimaj landoj de la mondo. Esperanto signifas, ke eblas pli bone kompreni kulturon de aliaj nacioj. Esperanto signifas, ke pere de ĝi eblas vojaĝi almenaŭ surpapere kaj eble pli bone ol vojaĝantaj turistoj esplori landon de miaj geamikoj. Pere de Esperanto mi povas kontaktiĝi kun diversaj verkistoj kaj poetoj. Esperanto signifas por mi, ke mi povas legi poemojn, ke mi povas legi prozon, kiun mi en mia gepatra lingvo ne enkapiĝis ... do Esperanto signifas, ke eblas konatiĝi kun kulturo de la tuta mondo. Esperanto signifas, ke eblas legi novajn kaj novajn gazetojn. Esperanto signifas, ke ĝi ne estas nur nekonata lingvo, sed konatiĝi kun ĝia kulturo, konatiĝi kun ĝia evoluo. Esperanto estas inter-komprenilo (proŝtedek k dorozumĕni) inter homoj de malsamaj kulturoj, kutimoj, malsama koloro de haŭto. Esperanto signifas esperon, ke malaperas lingvobariloj.

Výchovný ústav Bona Espero uplatňuje princip Spojených národů „pomoci lidem, aby si sami pomohli“. Učí venkovské děti, jak si levnými prostředky mohou zlepšit své životní podmínky. Jako příspěvek k Jubilejnímu roku esperanta a Mezinárodnímu roku lidí bez přístřeší, Bona Espero vystavěla v r. 1987 další dům nových dětí bez domova k jejich ubytování a pohoštění účastníků setkání bývalých žáků a esperantských seminářů. Finančně přispěla „Společnost pro pokrok Bona Espero“, ke které náleží esperantisté z jedenácti zemí.

Blahopřejeme! Předseda Českého esperantského svazu inĝ. Petr Chrdle úspěšně obhájil svou kandidátskou práci před vědeckým kolegiem Ústavu radiotechniky a elektroniky Československé akademie věd. Ani v této pro něj tak důležité chvíli nezapomněl na propagaci esperanta. Autoreferát jeho kandidátské práce obsahuje dvoustránkové resumé v esperantu.

20 let Českého esperantského svazu. Slavnostní setkání bude uspořádáno ve 3.čtvrtletí roku 1989, avšak místo ještě není známé. Hledá se klub, který by měl sály a ubytování a také mohl připravit kulturní, pracovní program a výlety. Kdo se odváží?

E.T

Bazaj informoj pri Germana demokratia respubliko Esperanto-junularo: Oficiala titolo: Junulara komisiono de Esperanto Asocio en Kulturligo de GDR, Otto Nuschke str. 1. Berlin, DDR-1080. Membroj 300. Estraro 7 personoj. Komisiono 25 personoj, distriktaj respondeculoj en 13 el 15 distriktoj. Ligilo: Junulara cirkulero, havebla ĉe estraranoj: Thorsten Bendias, Wollankstr.1, Berlin 1100 – aŭ Thorsten Lemke, Wetterseestr.1, Berlin 1100 aŭ Andreas Penk, Zingstr. 43, Berlin 1095. - Agado 1988: Sendo de karavano al JES 88 Szeged. Junulara renkontiĝo 3.6.a de oktobro 88. Por la jaro 1989 GDREJ planas aŭtunan konsultigon de junularaj reprezentantoj de Socialismaj landoj Esperanto Asocioj.

Slavismoj en Esperanto.

Neinformitaj homoj, precipe el slavaj rondoj iam riproĉas al Esperanto, ke ĝia deveno estas romanika-germana kaj ke ĝi enhavas nenion slavan. Jam tio, ke Esperanto estis kreita el elementoj, kiuj pliparte estas en hindoeŭropaj lingvoj atestas, ke inter Esperanto kaj slavaj lingvoj estas lingvo rilata, kiun nefakulo unuavide ne ekkonas. Ekzemple esperanta numeralo „tri“ originas hindoeŭrope; en malnova hinda lingvo esprimas ĝin la formo „trays“, en malnova greka „treis“, angl. three, germ. drei, ĉeĥe tři. Tia estas en granda parto de esperantaj vortoj.

El 2635 radikoj, kiujn enhavas fundamenta esperanta vortaro „Universala vortaro“ de d-ro Zamenhof el la jaro 1893 komprenas slavoj 40% de vortoj. Kelkaj bazaj esperantaj fenomenaj estas nure de slava origino. Ĝi estas precipe esperanta akcento sur la antaŭlasta silabo laŭ la pola, verbas „aspektaj“, t.e preciza diferencigo laŭ slava ekzemplo de verboj momentaj finaspektaj, daŭraj, ripetaj kaj ripetantaj (pafi, portadi, portatadi). Esperantaj vokaloj estas dounfermitaj same kiel en la slavaj lingvoj, diakritikaj signoj uzataj por sonoj ĉ, ĝ, ĵ, ŝ, ĥ, estas laŭ la ĉeĥa; enkonduko de la 4a kazo ebligas en Esperanto liberan vortordon laŭ la ekzemplo de slavaj lingvoj, finaĵo de infinitivo -i estas slava, samkiel pronomo „vi“. Komencaj literoj de pronomoj kiu, tiu, neniŭ estas enkondukitaj laŭ la rusa, pola, ĉeĥa.

Základní informace o Esperantské mládeži Německé demokratické republiky: Oficiální titul: Mládežnická komise Esperantského svazu kulturní ligy NDR, DDR-Otto Nuschke str.1, 1080 Berlín. 300 členů. Předsednictvo 7 osob. Komise 25 osob, okresní důvěrníci ve 13 z 15 okresů. Mládežnický oběžník, k dostání u členů předsednictva: Thorsten Bendias, Wollankstr.1. Berlín 1100, nebo Thorsten Lemke, Wetterseestr.1., Berlín 1100, nebo Andreas Penk, Zing str. 43, Berlín 1095. Aktivita 1988: Vyslání karavany na JES Szeged. Mládežnické setkání 3.-6. října 88. Pro rok 1989: GDREJ plánuje podzimní konzultaci mládežnických reprezentantů Esperantských svazů socialistických zemí.

Slavismy v esperantu.

Neinformovaní lidé zejména ze slovanských kruhů někdy vytýkají esperantu, že je původu románsko-germánského a že nemá v sobě nic slovanského. Už proto, že esperanto je utvořeno z prvků, které jsou většinou v indoevropských jazycích, dotvrzuje, že mezi esperantem a řečmi slovanskými je jazykový vztah, jež neodborník na první pohled nepoznává. Např. Esperantská číslovka „tri“ je původu indoevropského; v staré indiĉtině vyjadřuje ji tvar „trays“, ve starořeĉtině „treis“, angl. three, něm. drei, ĉesky tři.

A tak je tomu ve značné části esperantských slov. Z 2635 kořenů, jež obsahují základní esperantský slovník „Universala vortaro“ Dr Zamenhova z r.1893 rozumí Slované 40% slov! Některé základní zjevy esperanta jsou výhradně původu slovanského. Je to především přízvuk na předposlední slabice podle polštiny, slovesné „vidy“, tj. přesné rozlišení po slovanském způsobu sloves okamžitých od sloves trvacích, opětovacích a opakovacích (stříletí – střelití, nositi – nosívati, nosívávati). Esperantské samohlásky jsou polozavřené jako ve slovanštině, rozlišovací znaménka užívaná pro zvuky ĉ, dž, ž, ŝ, ch, jsou podle ĉeštiny, zavedení 4. pádu umožňuje v esperantu volný slovosled podle vzoru slovanských jazyků, koncovka neurĉitého způsobu -i je slovanská, stejně jako zájmena „vi“. Poĉáteĉní písmena zájmen kdo, ten, nikdo jsou zavedena podle ruštiny, polštiny, ĉeštiny.

Slavdevena estas ankaŭ prefikso „pra“, sufikso „ĉj“ (ruse golubĉik, pole chlapczyk, ĉeĥe Karlíček), „nj“ (ruse+serbe Manja, ĉeĥe Máňa), prepozicioj „po“, „krom“, ĝenerala esperanta titolo „moŝto“ (pol. jegomosc). En Esperanto mallongiĝas per gerundio samkiel en slavaj lingvoj nur tiuj frazoj de frazaroj, kiuj havas la saman subjekton kun la ĉefa frazo.

Kaj oni povus mencii pluajn ekzemplojn, ke slavaj lingvoj multe kontribuis al kreo de Esperanto kaj Esperanto enhavas multon slavan. Verda voĉo, Doksy 1952, (Dr Pitlík)

Slovanského původu je též předpona „pra-“, přípony „ĉj“ (rus. golubĉik, polsky chlapczyk, ĉesky Karlíček), „nj“ (rusky+srbsky Manja, ĉesky Máňa), předložky „po“, „krom“, všeobecný esperantský titul „moŝto“ (pol. jegomosc). V esperantu se krátí přechodníkem jako ve slovanských jazycích jen ty věty souvětí, jež mají stejný podmět s větou hlavní.

A bylo by možno uvést další příklady toho, že slovanské jazyky mnoho přispěly k utvoření esperanta, a že esperanto má v sobě mnoho slovanského.

Verda voĉo, Doksy 1952, (Dr Pitlík)

PILAFO – uzbeka specialaĵo. Uzbekaj naciaj pladoj (mísy) havas siaspecan guston, agrablan aspekton (vzhled) kaj altan nutrivecon. Ĉio ĉi faris ilin popularaj inter multaj popoloj de Sovet-unio. En uzbeka kuirarto pilafoj okupas signifan lokon. Ili estas kuiritaj diversmaniere – kun fritita aŭ boligita ŝafaĵo, ovoj, birdoj, kun sekvinbero (hrozinky), pizo (hrách), cidonio (kdoule), ajlo (ĉesnek). En kelkaj regionoj de Uzbekistano oni kuiras tre bongustan pilafon el tritiko. En ĉiu region de Uzbekio pilafoj estas kuirataj diversmaniere, en Andiĵan aliel ol en Samarkand, en Taŝkent aliel ol en Ĥorezm aŭ Buĥara. Tio dependas de la klimataj kondiĉoj. Estas bezonataj: 800 g da rizo, 400 g da viando (ŝafaĵo aŭ bovidaĵo, porkaĵo evitindas), oleo aŭ graso 300g, 300 g da karoto, 3-4 buloj da cepo, 1-2 piĉoj (ŝpetky) da anizaj kaj karviaj (kmín) semoj, ruĝa amara papriko, salo – laŭ la gusto. Necesas havi kaldroneton (kotlík) kun dika fundo (ordinara kaserolo ne taŭgas). Antaŭ ol procedi endas tranĉi viandon je 4-6 cm, cepon ringe je dikeco 1,5 – 2 mm, karoton pajle je dikeco 2-3 mm. Procedu jene: En la kaldrono ardigu la oleon ĝia aperas diafana fumeto. Per la ŝovelileto (lopatkou) metu la viando en la oleon, iom poste – la cepon. Fritu ĝis la cepo ricevas orebrunan koloron, Tuj metu la karoton kaj fritu ĝis la sama stato. Kune kun la cepo metu la salon, paprikon, anizon kaj karvion. Dum la fritado ofte kirlu ĉion per la ŝovelileto, ne reduku la fajron. Verŝu (zalej) ĉirkaŭ unu litron da akvo. Kiam ĝi ekbolos, reduku la fajron kaj boligu ĉion dum 30-40 min. Dum la tempo brogu (spař) la rizon kaj tuj lavi ĝin per malvarma akvo 3-4 foje, iom frotante la rizon inter la polmoj (dlaně). Kiam la lasta akvo estas diafama (průsvitná), metu la rizon en la bolantan akvon egaltavole per ŝovelilo. Plusu (přidej) akvon, ke la lasta kovru la rizon je 1,5-2 cm. Gustumu por ekscii la salitecon (slanost). La rizo ne devas esti miksita kun la fritiĵo. Ĝi restu supre. La akvo devas boli egal super la rizo. Kiam la akvo malaperos kaj videbliĝos la rizo, kolektu ĝin konuse de la kaldonrandoj al la centro. La altaĵeton kovru (přikryj) per telereto. La kaldronon kovru pli-malpli hermete kaj eĉ pli reduktu la fajron. Post 10 ĝis 15 minutoj estingu estingu la fajron (zhasni). La kaldrono staru kovrita dum 15-20 minutoj. Pos tio skrupule (úzkostlivě) intermiksi ĉion, elmetu la pilafon (aŭ tion, kion vi produktis) sur grandan plata pladon aŭ sur telerojn. La viandon metu supren.

Kun pilafo sur la tablon konsilida mezi SALATON EL TOMATOJ KAJ KUKUMOJ. Ĝi taŭgas kiel memstara plado aŭ kiel helpa por ŝaŝliko, pilafo kaj aliaj satigaĵoj kiel garnaĵo aŭ moligaĵo de la graseco. Estas bezonataj: 500 g da tomatoj, 200 g da kukumoj, 1 bulbo de cepo, piĉo de papriko, salo. Procedu jene:

La tomatojn tranĉu ronde, la kukumojn, se ili junas ne senŝeliginte, la cepon tranĉu ringe. Ĉion intermiksi kun salo kaj papriko. Metu la salato en salatujon, garnu per „tulipo“ el tomato, kukumoj kaj ringoj el la cepo. BONAN APETITON! Dum kaj post la manĝado konsilindas trinki varmegan teon. Ne trinku krudan akvon! Gardu stomakon! (Ĉion kuiris multfoje, manĝis kaj regalis gastojn

Eŭgeno S. Perevejtajlo, Taŝkento

NILEGIS ...

En Esperanto el aprilo 1988 aperis artikolo de Bernard Golden: Lingvo cent jara – lingvo erara. Komence la aŭtoro atentigas, ke nuntempe trakuras Esperantujon amas-histerio de uzado de neologismoj, kiuj senlime kaj malutile kreskigas lingvan bazon de Esperanto, kie sobra uzado apartenas al la plej grandaj avantaĝoj de nia lingvo. Dum en 1987 estis aranĝitaj multaj interlingvistikaj seminarioj, neniun temo turniĝis kontraŭ daŭre ripetigantaj eraroj, kiuj aperas eĉ en serioza gazetaro. Li starigis demandon, ĉu en unu jarcento ĝenerala pliboniĝis lingva nivelo, ĉu kelkaj gramatikaj reguloj ne estas daŭre nealproprigeblaj /uzado de difina artikolo). En franca, rusa kaj esperanta versio de Fundamenta gramatiko estas jena frazo: „La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵojn, povas tute ĝin ne uzi.“ En Fundamenta Gramatiko estis aldonita: „en la unua tempo“. Nu, tiu „unua tempo“ ja longe daŭris – tutan jarcenton! - ĉar ankoraŭ hodiaŭ estas esperantistoj, pliparte parolantoj de slavaj lingvoj, kiuj ne kapablas ĝuste uzi la difinan artikolon en Esperanto. Eble ili sukcesos en la dua jarcento – skribas akra kritikisto Golden moka nomata „nia papo“. Jam en la jaro 1907 Emile Boirac, skribante pri lingva nivelo de verkoj en literatura konkurso „La revuo“ listigis la plej oftajn erarojn: uzado de vortoj, ĉu ne-Esperantaj, ĉu laŭ misĝusta signifo; misuzo de kunmetitaj tempoj de verboj: uzado de pasivaj participioj de netransitivaj verboj; superflua uzado de sufiksoj -aj kaj -ig, malĝusta uzado de posedaj adjektivoj; uzo de akuzativo post netransitivaj verboj, aŭ post prepozicioj ne postulantaj ĝin.

Fine Golden argumentas kontraŭ kredo de novaj paronimaj paroj, ĉar tiaj jam ekzistantaj estas daŭraj gramatikaj kaptiloj. Estas malmultaj tiuj, kiuj sen hezito prave uzas domaĝi/damaĝi, kompensi/ rekompenci, oferi/oferti, ktp.

Kaj kion aldoni al la artikolo? En la dua jarcento ne nur propagandi Esperanton, sed ĉiu perfektigi siajn lingvosciojn. Ĉu vi jam trastudis la novan gramatikon de Malovec? (kontraŭ 18 Kĉs sendos Ĉeĥa esperanto-asocio).

Ĉetli jsme ...

V Esperantu z dubna 1988 byl publikován článek Bernarda Goldena: Jazyk stoletý – jazyk omylný. Na počátku autor upozorňuje, že nyní probíhá v esperantském prostředí hromadná hysterie užívání neologismů jež bezmezně a škodlivě dávají narůst jazykovému základu esperanta, k jehož největším výhodám našeho jazyka. Ačkoliv v r. 1987 bylo uspořádáno mnoho interlingvistických seminářů, žádné jejich téma se neobrátilo vůči neustále se opakujícím chybám, jež se objevují i v seriózním časopisectví. Staví otázku, zda po jednom století se všeobecně zlepšila jazyková úroveň, zda nejsou některá gramatická pravidla trvale nezvládnutelná (užití určitého členu). Ve francouzské, ruské a esperantské verzi Fundamenta Gramatiko je tato věta: Osoby, pro které je užití členu nesnadné, mohou ho zcela vypustit. Ve Fundamenta Krestomatio bylo dodáno „v začátcích“. Nu, tento začátek trval věru dlouho – celé století! - protože ještě dnes jsou esperantisté, převážně mluvící slovanskými jazyky, kteří správně užívat určitého členu v esperantu. Snad budou mít úspěch v druhém století – píše ostrý kritik Golden, posměšně nazývaný „naš papež“.

Už v roce 1907 Emile Boirac, píšíc o jazykové úrovni děl literárního konkursu „La revuo“ sestavil seznam nejčastějších chyb: aplikace neesperantských slov nebo ve špatně užitém významu; špatné užití složených slovesných časů; užívání pasivních příčestí nepřechodných sloves; nadbytečné užívání přípon -aj a -ig; nesprávné užívání přivlastňovacích přídavných jmen; užití 4.pádu po nepřechodných slovesech nebo po předložkách, které jej nevyžadují.

Dále Golden argumentuje proti vytváření nových paronimních párů, protože již ty existující jsou trvalými gramatickými chytáky. Málo je těch, kteří bez váhání správně domaĝi/damaĝi, kompensi/ rekompenci, oferi/oferti atd.

Co dodat k článku?

V druhém století nejen propagovat esperanto, ale hlavně každý zdokonalit své jazykové znalosti. Již jste prostudovali novou Malovcovu gramatiku? (Za 18.- Kĉs pošle Český esperantský svaz).

KIEL DIRI? PRAKTIKA ESPERANTA FRAZEOLOGIO: Lantaigne. Daŭrigo

Temo: FELIĈO – MALFELIĈO:

„Pelu mizeron tra la pordo, ĝi revenos tra l' fenestro.“ - FELIĈO pura, perfekta, nemiksita, sennuba, ekstaze, perdita, facila atingebla. Akiri, perdi feliĉon! Ebria de feliĉo. Boli de ĝojo. Naĝi en plena feliĉo. Sopiri al feliĉo. Ĝoji pri ies feliĉo. Favorato, dorlotato da feliĉo. Mi estas la plej feliĉa homo sur la tero, en la mondo. Larmoj de ĝojo. Doni al iu antaŭguston de tiu feliĉo. Feliĉo estas delikata floro. Vitro kaj feliĉo ne estas fortikaj. Pensi nur pri ĝojoj kaj plezuroj. Nur suferinto ŝatas feliĉon. Esti levita en la sepan ĉielon. Levita ĉe la supro de feliĉo.

MALFELIĈO: Antaŭflari, sperti malfeliĉon. Vidi ĉion nigra. Pesimismo (por la pesimisto glaso estas neniam duonplena, sed ĉiam duonmalplena). Certe okazis al li malfeliĉo. Malfeliĉo trafis lin. Li estas la aŭtoro de sia malfeliĉo. Ĉiu forĝas sian forton. Malforta volo, ku rompiĝis sur la cirkonstancoj. Amasiĝis obstakloj, baroj, malfeliĉaĵoj. Maljusteco de la sorto. Ne havi ŝancon. Peza bato de la sorto. Submeti sin al la sorto. Per kio kolerigis la Fortunon, ke ĝi ... Barakti en financa embaraso. Esti en tre premita situacio. Malriĉa, kiel muso preĝeje. Mi, simple kaj litere (zkrátka a dobre), ofte ne havas eĉ kion manĝi, por kio min vesti. Krom la vestaĵo sur la korpo mi posedas nenion. Li havas tiom, kiom li surhavas. Jen la fidela bildo de mia situacio. Pezaj zorgoj premas mian zorgon. Ŝuldi al iu monon. Droni en ŝuldoj. Sidi en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj. Amasigi ŝuldon sur ŝuldon. Li ne volis sin devontigi (zavázat) en la futuro por pago de grandaj sumoj. Ne sufiĉas ploro al kreditoro. Datfalo (kiam oni devas pagi ŝuldon). Lombardejo (zastavárna). Lombardi. Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de majo. Mi senŝuldiĝos, kvitiĝos la 9-an de majo. Havi multe da zorgo. La zorgo manĝas la homojn. Sidi en vera kaĉo (kaše). Ĝiskole (po krk) en la peĉo (smŭla). Implikiĝi en malagrablaĵoj. Maro da mizeroj. Suferoj ne venas izolitaj. Ŝi staris ankoraŭ ĉe la komenco de sia Kalvario. Alporti al iu la misfortunon. Redukti iun al la mizerio. Amarigi, veneni, maldolĉigi la vivon al iu. Alkonduki iun al mizero. Niaj esperoj falis en abismon. Enfali en malesperon. Teni sian ekzistadon. Mizeran. La fundo de mizero. Suferi grandan, profundan mizeron. Ĉiu havas sian kaŝitan mizeron. Senfina litanio de plendoj. Persekutita de la fatalo. Subfali sub la malfeliĉo. Hunda vivo. Vivi sur la tero kiel en infero (peklo). Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita. Ŝi estas virino pli malfeliĉa, ol kiom mi opiniis. Plendi kontraŭ la sorto. Lamenti. Ĝemi (vzdychat). Veki kompaton. Eksenti kompaton al iu, pro io. Rigardi la aferon per pli kompatata okulo. Ĉiu estu bona kaj kompatema al sia frato. Aktiva pruvo de kompatato. Kompatinda. Tio premas, fendas, ŝiras, traboras la koron. Havi bonan koron. Vi estas tre bona kontraŭ mi. Abnegacio (odříkání se). Havi ŝtonon por koro. Malmola koro. Lasi iun en peĉo.

KORESPONDI DEZIRAS:

Gastema juna paro serĉas amikojn. Marina kaj Sergej Demianov, Imraimova 55-16, SU-420044 Kazano, Sovetunio.

Nsako – Tujifimpa – Nkwangi, c/o Naiba – Naoko, Dpt. Technique Unibra, Sce Garage, B-P. 7600 Kin – Kingabwe, Zairo, Afriko, 20 j., zairano, pri komputiko kaj aliaj.

Diomedes Rodrigues Leite, Rua Portugal 236, Piquete, Est. Sao Paulo, Brazilo, CEP 12620, komencanto.

Esperantista familio: Lungikisa Bondo, pri elektroniko kaj sporto, Lungikisa Sumbu pri instruado kaj pedagogioj, Lungikisa Bundi kaj Kiese Lukinda pri ekonomio (ĉiuj sinjoroj). Fraŭlino Lungkiss Kavovi pri virinaj aferoj. Komuna adreso: B.P. 1007, Kinhasa/Limete, Zairo.

Yian-a Esperanto Asocio, Yian, Heilongjiang, Ĉinio, serĉas korespondantoj por siaj anoj

Tanghahana Esperanto-asocio, 3 hao Xinxiniang, Tangahan, Hebei, Ĉinio, klubo serĉas korespondamikojn el la tuta mondo

Ba Jingke, Changji Shi Jiaoshi Jinxiu Xuexiao, Wianjang, Ĉinio, interŝanĝas diversajn E-filatelajojn (E-pm, pk, UTK).

S-ro Yauan Yigchun, 66 Wendelu, Fuyang, Anhui, Ĉinio, 25-j. Oficisto pri kulturo kaj interŝanĝo defilatelajoj.

Malgorzata Zmuda, Debica ul. Tuwima 5/43, PL-39200, Pollando, 19-j lernejanino pri literaturo, folkloro, turismo, filatelio.

Ludwig Schödl, Rosa Luxemburg str. 37 DDR-1950, pri ĉiuj temoj, perfekta esperantisto

F-ino Kordula Hassel, poste restante, DDR-2824 Zarentin, 18-j.

Tomasz Prochniak, Wawelno, PL-89-413, Pollando, 26-j, akvaristo, pri literaturo, muziko, filatelio, ornitologio.

Zbygniew Malyszko, Bialystok, Zajecza 17, PL-15531, Pollando, abelisto, pri literaturo, muziko, fotoarto, ĉinĉil-bredisto, 50-j.

Jerzy Gralak, Warszawa, al. Waszyngtona 37m76, PL-04-015, Pollando, 40-j. pri naturismo.

Timm Emil, pct. Kyritz, O. Grotewohl Str 3a DDR-1910 18-j. pri ĉiuj temoj

Scharze Antje, pct Wolgast, Diesterweg 5, DDR-2220, pri ĉiuj temoj

Esperantský klub

295 01 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka

Imprimé 50/%

Presajo